

## Mallonga raporto pri la KER-ekzamenoj en 2012

En la kvara jaro de la KER-sistemo okazis 8 sesioj, inklude la Unuan Tutmondan Ekzamentagon. La komisiitoj agadis en 7 urboj de 7 landoj: Hajnano (CN), Greziljono (FR), Bydgoszcz (PL), Hanojo (VT), Nitra (SK), Mazara del Vallo (IT) kaj Moskvo (RU). Al tiuj nombroj aldoniĝas 29 urboj de 19 landoj kun 60 helpantoj en la loko de la tutmonda ekzamensio.

Entute en la jaro 2012 estis precize 500 ekzamenokazoj. La kandidatoj venis el 38 diversaj landoj. Pluraj landoj, ĉefe aziaj, ĉi-jare havis la unuajn kandidatojn. Estis kelkaj personoj, kiuj ene de tiu ĉi jaro ekzameniĝis plurajn fojojn, ĉu pri la diversaj partoj de la sama nivelo ĉu trapasinte erojn de la diversaj niveloj.

Laŭ la niveloj estis relativa homogeneco inter la kandidatoj (B1: 180, B2: 157 kaj C1: 163). La elekton de la ekzamentipoj multe influis la fakto, ke dum la tutmonda ekzamentago eblis nur la skriban parton trapasi. Do, en tiu kazo temas ne pri la prefero de la kandidatoj, sed simple pri la disponigitaj ebloj.

2012	B1	Malsukceso	B2	Malsukceso	C1	Malsukceso	Sume	Malsukceso
Parola	3	0 - 0,0 %	7	1 - 14,0 %	11	0 - 0,0 %	21	1 - 4,7 %
Skriba	142	25 - 17,0 %	113	3 - 2,6 %	104	3 - 2,8 %	359	31 - 8,6 %
Kompleksa	35	2 - 0,5 %	37	2 - 0,5 %	48	0 - 0,0 %	120	4 - 3,3 %
<b>Sume</b>	<b>180</b>	<b>27 - 15,0 %</b>	<b>157</b>	<b>6 - 3,8 %</b>	<b>163</b>	<b>3 - 2,2 %</b>	<b>500</b>	<b>36 - 7,2 %</b>

Unuan fojon ni publikigas la statistikon pri la malsukcesoj de la ekzamenoj, kiu en tiu ĉi jaro indikas la plej altan nombron: 7,2 %. La plej tikla parto estis en la nivelo B1, kie el 142 personoj malsukcesis 25. La stumbloj okazis plejparte dum la tutmonda ekzameno, kaj la akcidento karakterizas kelkajn konkretajn landojn.

La ekzamenkomisiono dediĉos grandan atenton pri tio, ke en la koncernaj landoj - ĉefe ne-eŭropaj - oni eĉ pli da informoj ricevu pri la enhavo de la ekzamenoj kaj la strukturo de la testoj kaj taskoj. Krome necesas atentigi pri la respondeco de la kursgvidantoj kaj ekzamenorganizantoj, kiuj eble trokuraĝigas ankaŭ tiujn kandidatojn, kiuj ankoraŭ ne pretas je ekzameniĝo.

En la ekzameniĝo ankaŭ ĉi-jare la plej aktivaj estis francoj (151), ilin sekvis rusoj (80) kaj meksikanoj (50). En la du laste menciitaj landoj la kandidatoj ekzameniĝis en po 2 urboj, dum francoj en 11 francaj urboj kaj dise en la mondo en diversaj sesioj.

En la kvar jaroj entute estis aranĝitaj 32 sesioj en 25 landoj kun partopreno de 1025 kandidatoj el 60 landoj.

Nivelo Jaro	B1	B2	C1	Sume
2009	17	25	84	126
2010	35	48	75	158
2011	42	72	127	241
2012	<b>180</b>	<b>157</b>	<b>163</b>	<b>500</b>
<b>Sume</b>	<b>274</b>	<b>302</b>	<b>449</b>	<b>1025</b>

Lando	Su mo
1. Francio	251
2. Brazilo	152
3. Rusio	87
4. Meksiko	53
5-6. Germanio	49
5-6. Italio	49

La 284 ekzameniĝojn de la unuaj du jaroj ni preskaŭ duobligis en 2011 kun 241 ekzamenokazoj. En 2012 denove okazis preskaŭ duobligo, estis 500 ekzamenokazoj, sume ni havas 1025 ekzameniĝintojn. Tio inkludas miksitaĵajn nivelojn kaj la samajn personojn plurfoje, se ili plurfoje trapasis ekzamenon.

La ekzamenkomisiono ankaŭ por 2013 antaŭvidas multajn eventojn. Jam nun estas lanĉitaj pluraj sesioj kaj meze de februaro ni jam scias ke en 22 urboj certe okazos sesio kadre de la Dua Tutmonda Ekzamentago la 8an de junio. Tiu evento estos eĉ pli signifoplena ĉi-jare, ĉar en pluraj lokoj ekestos la eblo trapasi ankaŭ la parolan parton de la ekzamenoj.

Ĉio ĉi postulas grandan organizadon kaj bonan kunlaboron, kiun kunordigos- tra edukado.net – Katalin Kovats, estro de la ekzamenkomisiono de UEA.

La Jaro 2013 estos ankaŭ pro tio mejloŝtona, ĉar atendeblas kvalitkontrola proceduro, flanke de la Asocio de Lingvo-Testistoj de Eŭropo (ALTE), kiu en kazo de sukceso levas nian ekzamensistemon je pli alta rango.

Pliajn informojn pri la ekzamenoj trovu en la paĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net).

Katalin Kováts, gvidanto de la ekzamenkomisiono de UEA.